
nia voĉo

madrida esperanto-liceo aprilo 2024

## MULTAJ PLANOJ POR APRILO EN MADRIDO

Dum tiu ĉi venonta monato tiom multaj eventoj anonciĝis ke apenaŭ eblos trovi ekskuzon por ne esperantumi en Madrido en ajna aprila semajno.




Jam la 1-an de aprilo, en la Casa de Galicia en Madrid (Domo de Galegio), okazos poezia recitalo, ene de ciklo de galegaj poetoj. Unu el la eroj estos la plurlingva deklamado de la poemo "A Cabeleira" de Claudio Rodríguez Fer, kiu estis publikigita en pli ol sepdek lingvoj. Unu el la versioj estos en Esperanto (https://www.acabeleira.com/esperanto.html), kaj pri la deklamado zorgos Mati Montero.

La ĉeesto estas libera, kaj ni invitas akompani la eventon. La horo estas la 19,30 de tiu ĉi 1-a de aprilo, kaj la adreso estas la strato Casado del Alisal, 8, de Madrido.

Ni memorigas ankaŭ alian eventon en tiu unua semajno: la unuasabata renkontiĝo en la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrohaltejo Alsacia) okazos la 6-an de aprilo, ekde la 18,30.

## EKSKURSO EN LA KAMPARO

La sabaton 13an de aprilo ni ekskursos en la montaro. Sed ne temas pri vera grimpado de montoj; estas itinero sufiĉe ebena en loko nomata La Barranca, apud Navacerrada (pueblo). En tiu ligilo aperas priskribo de la itinero: https://es.wikiloc.com/rutas-senderismo/la-barranca-fuente-de-la-campanilla-mirador-de-las-canchas-circular-6070609.

Ni iros per privataj aŭtoj, kaj startos el Madrido je la 9,00. Anonciĝu tiuj kiuj havos liberan lokon en sia aŭto kaj tiuj kiuj bezonos lokon en alies aŭto. Ĉiu kunportu sian manĝon.

Pri la vetero, siatempe ni vidos la prognozon. La alteco sur marnivelo estas ĉ. 1.300 m.

## NOKTO DE LA LIBROJ

Madrida Esperanto-Liceo estis denove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, kiun organizas la Madrida Registaro, okaze de la Tago de la Libro. Ĉijare ĝi okazos la 19an de aprilo kaj la temo ĉijare "la hejmo/domo por ĉiam". La programo aperos ĉe: https://www.madrid.org/lanochedeloslibros/2024/.




MEL organizis eventon por tiu tago, kun la partopreno de Miguel Fernández, kiu prelegos pri: "*La Casa de Bernarda Alba*: traducción al esperanto y claves para su interpretación".

La loko estos la sidejo de MEL, denove malfermota post la riparoj de la pasintaj tagoj, la horo estos la 18,00 kaj la ĉeesto estas libera. Ni planas elsendi ĝin rete, pere de la jutuba kanalo de MEL, en la adreso: https://www.youtube.com/MadridaLiceo. Ni anoncos la detalojn kelkajn tagojn antaŭe, por ke ĉiu povu ĝui ĝin, sed ni rekomendas ke, se vi loĝas en Madrido, vi ĉeestu la eventon en la sidejo mem.

## LEGADO DE DONKIĤOTO

Ankaŭ en tiuj tagoj, Esperanto denove partoprenos en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, organizata de la Círculo de Bellas Artes. Nia vico estas antaŭvidata por la merkredo, la 24a de aprilo, en ties sidejo.

Kiel en pasintaj jaroj, ni havos du vicojn por legi paragrafon de la verko, en la internacia lingvo. Se vi neniam partoprenis, ni invitas vin anonciĝi ĉe la Liceo, ĉar, kiel en aliaj okazoj, novuloj havos prioritaton por tiu legado. Ĝi estas interesa sperto, kiun ni rekomendas al ĉiu, ĉu komencanto aŭ veterano.

## HISPANA(J) KONGRESO(J) DE ESPERANTO

Atentu: dum tiu ĉi monato aprilo vi povas aliĝi al la ĉijara Hispana Esperanto-Kongreso kun rabatita aliĝkotizo. Ni memorigas ke la 82-a Kongreso okazos ĉi-jare en la valencia urbo Cheste, de la 5-a ĝis la 8-a de septembro 2024.




Cheste situas je ĉirkaŭ 30 kilometroj de la urbo Valencio, kaj havas gravan rilaton kun Esperanto, ĉar historie ĝi havis unu el la plej altaj proporcioj de parolantoj de la internacia lingvo rilate al la loĝantaro. La specifa sidejo estos la impresiga Eduka Komplekso, pli konata kiel la malnova “Labora Universitato”, kie ankaŭ eblos loĝi.

Jam disponeblas la retejo de la Kongreso, kiu iom post iom kompletiĝos kun pliaj detaloj, ĉe: https://kongreso.esperanto.es/. La aliĝilo jam estas inkluzivita en ĝi, kaj ankaŭ la eblecoj pri gastigado kaj manĝado en la kongresejo mem.

Krome, precipe por vizitantoj el malproksimaj lokoj, oni anoncis tre ampleksan post-kongresan programon, kun vizitoj al diversaj lokoj de la valencia regiono, gvidataj de lokaj esperantistoj.

Aliflanke, en februaro kvin homoj kunvenis en Madrido por studi la eblecon organizi la Hispanan Kongreson de Esperanto de la jaro 2025 en la urbo Sorio, ĉar oni faris plurajn kontaktojn kun la urbestraro de la urbo, kiu proponas senpagan uzadon de bela urbocentra kongresejo Espacio Santa Clara, historia trietaĝa konstruaĵo, plus aliajn diversajn apogojn. Oni kreis kongresan komitaton, kaj oni proponis la kandidatecon al la estraro de Hispana Esperanto-Federacio, kiu ĵus aprobis ĝin. La datoj estus de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2025. Restas sufiĉe da tempo, sed ni plu informos pri la planoj, kaze ke aliaj madridanoj pretas kunlabori.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

Pliaj renkontoj okazos lunde vespere en la sidejo. La riparoj, pri kiuj ni informis en pasinta numero, jam finiĝis, sed restas iom da purigado kaj ordigado, do la unuan lundon la sidejo estos ankoraŭ, sed ekde la 8-a de aprilo la kutimaj aktivadoj rekomenciĝos.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com